

**INFORMILO DE KKE — KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ**

Cooperativa Cultural dos Esperantistas Ltda. — Av. Treze de Maio, 47, sobreloja 208 — Centro  
Rio de Janeiro - RJ — CEP.: 20031-921 (21) 2544-4314 Fax: (21) 2220-7486  
retpoŝta adreso: [esperanto.kke@gmail.com](mailto:esperanto.kke@gmail.com) ttt-paĝo: [www.kke.org.br](http://www.kke.org.br)

**Nº 52****8ª JARO (NOVA FAZO)****SEPTEMBRO – OKTOBRO / 2009**

## NIA SAŬDADO



**Zilda de Souza Ferreira**  
**(1942 – 2009)**

## Eventos

**Jul, 1** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Jul, 3** – Palestra de Jorge Furman Bastos sobre *Curiosidades Bíblicas*, com a presença de 12 pessoas.

**Jul, 6** – Roda Literária / Prosa em esperanto.

**Jul, 8** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Jul, 10** – 1ª aula do Curso com Geraldo Mattos, com a presença de 18 pessoas.

**Jul, 20** – Roda Literária / Literatura brasileira em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

**Jul, 22** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Jul, 24** – Palestra de Elmir dos Santos Lima sobre o tema *Tajdo*, com a presença de 15 pessoas.

**Jul, 27** – Roda Literária / O estilo de Zamenhof / Coordenação de Aloísio Sartorato.

**Jul, 29** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Jul, 31** – *Festa dos Aniversariantes*, com a participação especial de *Genésio Nogueira* (violonista) e presença de 18 pessoas.

**Ago, 3** – Roda Literária / Prosa em esperanto/ Coordenação: Aloísio Sartorato

**Ago, 5** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Ago, 7** – Palestra de Alex Peixoto da Costa sobre o tema *Reiki, a Terapia do 3º Milênio*, com a presença de 13 pessoas.

**Ago, 10** – Roda Literária / Poesia em esperanto.

**Ago, 12** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Ago, 14** – Palestra de Robinson Mattos sobre o tema *Miaj Personaj Impresoj pri la 94ª UK*, com presença de 21 pessoas.

**Ago, 15** – Projeto “Conheça o Rio a pé” / Visita à Praça 15 de Novembro e adjacências, sob a direção de Laura Pereira de Alcântara e a participação de 10 pessoas.

**Ago, 17** – Roda Literária / Literatura brasileira em esperanto.

**Ago, 19** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles. .

**Ago, 21** - Palestra de Osmar de Agostinho Filho sobre *A Fascinante Vida de Bezerra de Menezes*, com a presença de 14 pessoas.

**Ago, 24** – Roda Literária / O estilo de Zamenhof.

**Ago, 26** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Ago, 28** – *Festa dos Aniversariantes*, com a participação especial de *Jefferson Sampaio* (pianista) e a presença de 12 pessoas.

## Doações para a Caixa Geral

Maria das Graças Carâp: R\$ 10,00 *Koran dankon!!!*

## Doações para a campanha Esperanto nas Bibliotecas

Não houve doações no bimestre.

## Remessa por conta da Campanha “Esperanto nas Bibliotecas

67. Biblioteca Pública Municipal Jornalista Jaime Câmara, Palmas, TO.

## Novos Associados

1724. Walter Soares de Carvalho; 1725. Lucila Soares do Vale; 1726. Neide Barros Rego; 1727. Edmo Rodrigues Lutterbach. *Estu ĉiuj bonvenaj!*

## Expediente

**InKo**, boletim informativo da Cooperativa Cultural dos Esperantistas; edição nº 52, setembro-outubro/2009.

**Coordenação:** Givanildo R. Costa, Presidente da KKE.

**Redação:** Aloísio Sartorato

**Revisão:** Célio F. Martins

## **REMEMORANTE LA 150 JAROJN PRI LA NASKIĜO DE ZAMENHOF**

Legante la lastan eldonon de la revuo "Esperanto", kiu rilatas al la monato Septembro, kian feliĉon oni trovas en la mienoj de pluraj personoj pro la signifa kaj speciala Universala Kongreso, okazinta en la naskiĝurbo de Zamenhof.

Kiom da laŭdaj vortoj starigitaj de gravaj esperantistoj el diversaj landoj pri la decida kaj kuraĝa starigo de iu necesega helplingvo por la tuta mondo, kies firmigo permesas al ĉiuj homoj de la Tero rompi plurajn barojn. Rompitaj baroj, kiuj surprizigas eĉ nin, uzantojn de la esperanta lingvo, pro la trafikaj rezultoj, kiuj en certaj spertitaj de ni momentoj ŝajnas preskaŭ miraklaj, kiel ekzemple en mia kazo, kiam en la jaro 2003, mi bezonis noticojn pri la minaco de invado de usonanoj al Irako, por la registara brazila radistacio "Rádio Nacional" (AM 980 KHZ), el la radisistemo "Radiobrás", cele al la programo "Os Repórteres" (La Raportistoj) kaj por Radio Rio de Janeiro (Am 1400 KHZ) cele al la programo "Esperanto, a Língua da Fraternidade" (Esperanto, la Lingvo de la Frateco), prezentata de mi, portugale kaj esperante, je la 15-a horo, kaj sonbendigita ĉiuvendrede, je la 23-a. Mi ricevis, per telefono, esperantlingve, el la irana S-ano Rezah Torabi, la de mi bezonatajn informojn, kiuj tuj poste konfirmiĝis. Tio ne facile okazus per alia lingvo krom Esperanto.

Tiam, unuafoje en Ameriko, specife en Brazilo, oni uzis Esperanton kiel radikomunikilon por informi al la publiko pri grava monda problemo, ĉar ĝenerale oni informas per iu nacia lingvo.

Konsiderante tion, aferon spertitan de mi kaj de multaj, mi konstatas la gravecon de nia majstro Lazaro Ludoviko Zamenhof. Estontproksime la tuta homaro rekonos kaj aprezos lin pro la de li kreita interkomunika instrumento.

Do en nia imagpovo mi ankaŭ ĝuas la spiritan etoson de la Bialistoka Kongreso, certigante la feliĉon kaj ĝojon de la ĉeeestantoj.

Mi bedaŭras, ke mi ne partoprenis en la 94<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto, en Pollando, por festi loke la 150-an datrevenan naskiĝtagon de Zamenhof. Do ni celebris en nia esperanta laborejo, kiu estas Kultura Kooperativo de Esperantistoj, kaj daŭre celebras en ĉiuj niaj konstantaj esperantlingvaj aktivecoj.

**Givanildo Ramos Costa**

## NIA SAŬDADO



Sebastião Formiga



Lorraine

Definitive la jaro 2009 ne estis bonŝanca por la E-movado de Rio de Janeiro.

En la komenco de la jaro forpasis nia karega Sebastião Formiga. Esperantisto el Niterói, li konstante sin prezentis en la Datrevenaj Monataj Festoj de KKE. Kompetenta muzikisto, li ĉiam plezurigis nin per la interpretado de belaj muzikoj pere de siaj blovinstrumentoj.

Poste venis la grava perdo de la neanstataŭebla Sylla Chaves, al kiu multon ŝuldas la brazila E-movado kaj al kiu ni dediĉis nian antaŭan INKO.

Sekvis la forpaso de Lorraine, edzino de nia karega Sherpell, la kasisto de KKE. Regule ŝi ĉeestis kun sia edzo al la monataj datrevenaj festoj de nia Kooperativo.

Kaj laste en la fino de septembro ni estis surprizita de la informo pri la forpaso de nia karega ZILDA FERREIRA, edzino de la unua Sekretario de KKE, Almir Ferreira.

ZILDA estis ĝisosta esperantistino. Senlaca disvastiganto de Esperanto, eĉ kiam ŝi laste estis en la hospitalo, ŝi profitis la okazon por informi pri la internacia lingvo al kuracistoj kaj flegistoj. Dum turismaj vojaĝoj kaj promenadoj, ŝi disdonis flugfoliojn pri Esperanto al kunvojaĝantoj. Ŝi mem subtenis la presadon de tiuj informiloj. Kaj ankaŭ ni ne forgesu la samideaninon, kiu regule ĉeestis la ĉiusemajnajn kunvenojn de KKE, ĉiam kunportante al bongustaĵojn preparitajn de ŝi mem.

Al Formiga, Sylla, Lorraine kaj Zilda nia ĉiama saŭdado!

**Aloísio Sartorato**

## LA REVO DE LEJZER LUDWIG ZAMENHOF ESTAS REALA



Mi ĉiam deziris koni aliajn landojn, sed bedaŭrinde estis malfacile, ĉar mi nur parolis la portugalan lingvon.

Mi aŭdis pri Esperanto dum prelego-prezentado fare de Hélio Ribeiro, kiu estis prezidanto de FEERJ (Federação Espírita do Estado do Rio de Janeiro), aktuale IEBM (Instituto Espírita Bezerra de Menezes). Li invitis ĉiujn ĉeestantojn lerni Esperanton kaj mi komencis studi la lingvon kun instruisto Walter Fontes.

En la unua leciono li parolis pri la universala frateco de Esperanto kaj en tiu momento mi emociiĝis pro liaj vortoj.

Mi estas en la movado ekde la fino de la jaro 2007. Pere de Neide Barros Rêgo, kiu kondukis min al multaj eventoj, mi konis la belegajn artajn vesperojn, kiu ĉiam okazas en la renkontiĝoj de esperantistoj. Esperanto estas mirinda!

Mia dua kaj aktuala instruisto estas Aloísio Sartorato. Post la fino de la baza kurso li diris, ke mi devas korespondi kun aliaj gesamideanoj por praktiki la lingvon. De tiam mi korespondas kun gesamideanoj el Pollando, Germanio, Bulgario, Hindujo, Jugoslavio, Francio, Danio ktp.

En la tago dudek-kvina de Julio mi kaj mia amikino, samideanino Rosana Caraméz, kune vojaĝis per aviadilo de Rio de Janeiro ĝis Parizo. Du tagoj antaŭ la komenco de la universala kongreso, ni iris per ekspresa trajno de Parizo ĝis Frankfurto urbo de gesamideanoj, kiujn mi konis pere de mia interreta amiko Kurt. Ili ricevis nin en la fervoja stacidomo kaj kondukis nin al sia bela kaj agrabla hejmo. Post du tagoj ili akompanis nin ĝis la stacidomo de Frankfurt, kie ni sekvis per ekspresa trajno al Varsovio. De Varsovio ĝis Bialjstok ni iris per ordinara trajno kaj venis al la fervoja stacidomo, kie helpanto atendis nin kun granda ĝojo.

## LA BELECO DE ESPERANTO KAJ MIA UNUA INTERNACIA KONGRESO

En mia unua internacia kongreso mi sentis min kiel infanon, kiu neniam rimarkis ĉiujn kolorojn de la vivo. Infanoj ne estas timemaj, estas kuraĝaj! Mi perdis mian tutan timemon kaj ĉiutage dum la kongreso mi parolis E-on kun gesamideanoj de ĉiuj landoj de la mondo. Nekredeble! Ili respondis kaj demandis al mi pri politiko, eduko, problemoj pri familiaj rilatoj inter gepatroj, junuloj, infanoj ktp.

Mia granda aventuro komenciĝis en la momento, kiam mi ekparolis E-on kun gesamideanoj de Hindio (Barato), Vietnamio, Rusio, Italio, Sudafriko, Israelo, Ĉinio, Japanio, Meksiko, Francio, Usono, Germanio, Nederlando, Pollando, Finnlando, Bulgario, Jugoslavio, Kanado, Danio ktp ..., kaj konstatis la belecon kaj fratecon, kiu konsistigas la internan ideon de Esperantismo. La interna ideo nomiĝas Homaranismo kaj emfazas la fratecon, kiu devas ekzisti en la koro de la granda esperantista familio. Mi travivis dum la sep tagoj la grandan interfratiĝon, kiu la internacia kongreso estas kaj ĉiam estos.

En la renkontiĝo 94<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto en Bialystok, loko kie naskiĝis la kreinto de Esperanto, la gesamideanoj estis la granda esperanta familio, pri kiu revis Zamenhof.

La nepo de Zamenhof, s-ro Zaleski Zamenhof, salutis la grandan esperantistan familion, kiu ĉeestis en la malfermo de la kongreso. Granda emocio ŝvebis en la tendego Zamenhof, kiam la himno LA ESPERO sonoris, larmoj banis la okulojn de ĉirkaŭ du mil gesamideanoj. Mi multe ploris dum la kongreso, precipe kiam mi vidis la nomon de nia kara amiko Sylla Chaves en la ĉambro, kiun la esperantistaj gejunuloj uzis. Mi parolis kun Probal Dasgupta, la prezidanto de UEA, pri la forpaso de Sylla Chaves; li diris ke okazis granda malgajno en la internacia esperanta movado.

Mi spektis diversajn prelegojn dum la kongreso, vizitis la libro-servon, la aŭkcion, aŭdis klasikajn kaj lirikajn muzikojn kaj dancis dum diversaj prezentadoj de popolaj kaj folkloraj muzikoj.

En la kongresejo, dum mi kantis kun kelkaj gesamideanoj, mi perdis mian kongresan libron; do mi petis al pluraj da ili, ke ili helpu min en la longa serĉo. En la sekvanta tago mi trovis mian libron.

Dum la kongreso, mi uzis la verdan stelon sur mia ĉapo. Diversaj eksterlandaj samideanoj petis mian verdan stelon. Ili multe admiris kaj ŝatis mian simpatian ideon. Post la kongreso mi ricevis de diversaj gesamideanoj mesaĝojn kun fotoj. Ili ankaŭ petis al mi, ke mi sendu al ili verdan stelon kiel la mian.

Mi estas tre feliĉa, ĉar fine mi parolas Esperanton, mi estas mondcivitano, mi ne plu bezonas aliajn lingvojn por vojaĝi tra la mondo!

**GRAÇA ELIANA THULER**



## Eterne

Niaj okuloj jam ne plu povas vidi vin,

Niaj brakoj jam ne plu povas brakumi vin,

Niaj ridetoj jam ne plu povas alveni al vi,

Sed en niaj koroj, “Sylla”, “vi” estos ĉiam plu.

Marilene

Rio de Janeiro – Brazilo

# SILENTO

Heloísa Seixas

Ŝi estis aktiva virino, kiu multe laboris. Sed ŝi firme kredis je la ideo, ke dimanĉo estas ja ripoza tago. Se ekzistas io, kion ŝi multe ŝatas, tio estas la semajnfina ripozo. Ŝi ne ŝatis eliri el la hejmo. Ŝia preferata dimanĉa programo estis sendube la ripozo. Vagi tra la tuta domo komplete sola, akvumi la plantojn en la verando, pretigi sian tagmanĝon tre malrapide, kaj fone de ĉio bona muziko, ludata mallaŭte, ĉiam mallaŭte. Fakte la silento, la kvieteco estis elementoj fundamentaj en ŝiaj ripozaj momentoj. Post la tagmanĝo ŝi ŝatis kuŝi iomete – io kion ŝi ne povus fari dum la semajno – sed ŝi ne endormiĝis. Pigre ŝi pensadis kaj poste elektis libron – ĝenerale detektiva romano - ŝia preferata legaĵo.

En tiu tago ŝi sentis sin speciale komforta. Ekstere estis suna tago kaj la sunradioj trairis la persienojn, farante la dormoĉambron pli agrabla. La posttagmezo estus promesplena. Ŝi kuŝiĝis por legi.

Sed apenaŭ ŝi malfermis la libron, io okazis. Subite, sen antaŭanonco. La dimanĉo, kiu komenciĝis tute normale, estis subite interrompita per iu bruo – aŭ estis iu krio? – kiu trakuris la straton, veninta el la malgranda placo kelkajn metrojn for de ŝia apartamento. La virino kun ektimo saltis el la lito. Kaj ŝi iris al la fenestro por konstati, kio okazas.



Estis iu viro, kiu per mikrofono kaj laŭtparolilo komencis prediki laŭtvoĉe. La sono estis misa kvankam tre laŭta kaj pro tio ŝi ne sukcesis kompreni bone kion li diras. Ŝi nur sukcesis percepti, ke temas pri predikanto, kiu klopodas varbi preterpasantojn por sia grego, atentigante ilin pri la pekoj de la mondo kaj pri la demonaj tentoj. Sed kio alvokis la atenton de la virino ne estis propradire la vortoj, sed la maniero ilin elparoli. Kun malamo. La silaboj eliris el la buŝo de tiu viro kvazaŭ ili estus fajraj lancoj, vortoj kriataj tiel proksime de la mikrofono, ke ili reeĥis en la laŭtparolilo kiel malgrandaj eksplodoj. Li ŝajnis obsedito.


Por la virino, kiu kulturis la silenton, tio estis agreso. Ŝi ne komprenis kiel la aŭtoritatuloj povas permesi tion. Ĉagrenite, ŝi fermis la fenestrojn, sed la rezulto estis nula. La krioj de la viro trairis la fendetojn de la fenestro, invadante ŝiajn orelojn.

Kaj ŝi pensadis. Tio estas tre stranga. Ŝi ne povas imagi iun, parolanta pri Jesuo per krioj. Por ŝi iu ajn esprimo pri fido devus esti diskreta, silenta, eble nur sugestita aŭ murmurita. Eĉ la grandliteraj gluafiŝoj sur la glacoj de aŭtoj ŝajnis al ŝi troigaj, agresemaj, kvazaŭ oni trudus al la aliaj la proprajn kredojn. Kaj dum ŝi klopodis ne pensi pri la ferocaj eksteraj kriadoj, subite ŝi memoris pri frazo de la verkisto Nelson Rodrigues rilate al la beleco de la silento en la momentoj de spirita meditado:

Dio sendube frekventas nur senhomajn preĝejojn.

*tradukis: Aloísio Sartorato*

## SONETO MEMORE AL SYLLA CHAVES



Poeton ni omaĝu poezie,  
Ĉar vorto vere belas ĝuste tie  
Kie muzoj troviĝas kaj la gloro  
Eterne cizeliĝas sur la oro

Poeto Sylla Chaves, vi ĉeestas  
Alian dimension, kie festas  
La pacaj batalantoj antaŭ Dio,  
Al Kiu preĝas nun Esperantio.

Nun restas tie ĉi nia sopiro  
Kaj tamen ĉe ni kreskas la inspiro  
El via vigla verko, verda flamo.

Adiaŭ nun ni diras, kara Sylla,  
Kaj ĉiam zorgu ni pri via brila  
Ekzemplo de espero kaj de amo.

Leite Jr.

## O CURIOSO “MECANISMO” DA CONVERSAÇÃO

1- INTRODUÇÃO – Há muitos professores de línguas que acham que “treinar a conversação” é algo apenas intuitivo... Muitos resumem essa tese com as seguintes palavras: “A gente aprende a falar, falando...”

Ora, essa tese não é de todo absurda, pois, afinal de contas, é mais ou menos assim que as pessoas aprendem a sua própria língua materna... E, se podemos aprender desse modo tão “natural” a nossa língua materna, por que não poderíamos fazer o mesmo em relação a uma outra língua, como é o caso, por exemplo, do nosso aprendizado de uma língua estrangeira “natural” – ou de uma língua “planejada”, como é o caso do Esperanto?

Ora, eu mesmo, há muitos anos, devo ter aprendido a falar em Inglês e, depois, em Esperanto, pelo mesmo sistema “natural”, ou seja, “aprende-se a falar, falando”... E, tanto no caso do meu aprendizado do Inglês, como no do Esperanto, acrescentei um elemento muito importante: a leitura cuidadosa, com muito auxílio do dicionário, de vários livros e revistas escritos nessas outras línguas...

Mas o objetivo deste artigo é declarar algo que, para mim mesmo, há muitos anos, mostrou-se como uma curiosa e enriquecedora “revelação” sobre o que se poderia chamar de “mecanismo profundo da conversação” – de que trataremos no segundo e último item.

2- O MECANISMO PROFUNDO DA CONVERSAÇÃO – Como diz o título deste artigo, esse “mecanismo” parece-me bastante “curioso”... Considero-o um verdadeiro “ovo de Colombo”, pois, como muitas grandes descobertas, as coisas mais simples podem ser a explicação de fatos bem complexos...

Há muitos anos, o grande esperantista Carlos de Lima Melo, oriundo de Fortaleza (agora, em Goiânia), disse-me ter lido algo sobre essa curiosa e – para mim – revolucionária “teoria sobre o mecanismo da conversação” – válida para qualquer língua...

Aqueles que se deram o trabalho de ler o texto “O que é o Método Misto”, em nosso livro “ESPERANTO CONVERSACIONAL” (Curso Básico), já devem conhecer a citada tese.

Mas... parece que a leitura dessa tese não causa o devido impacto nos leitores... Sugerimos, então, que os interessados releiam essa tese – e vejam se concordam conosco quanto ao seu grande valor.

E tal tese sobre o “mecanismo da conversação” resume-se em apenas 3 pontos principais. Acontece que o descobridor (ou descobridores) da tese, cujos nomes, infelizmente ignoro, teriam descoberto que a conversação – em qualquer língua – baseia-se em apenas 3 capacidades principais:

- Responder
- Perguntar
- Narrar

E... em nossos livros didáticos – principalmente no livro “Esperanto Conversacional” – tentamos treinar esses 3 aspectos da conversação por meio de 3 “Exercícios Orais” específicos, intitulados, respectivamente: “Responda”, “Pergunte” e “Narre”... Você já os analisou profundamente? Provavelmente, não...



Elmir dos Santos Lima prelegas



Geraldo Mattos gvidas kurson em KKE



Robinson Mattos prelegas



Gitaristo Genésio Nogueira sin prezentas



Laura Alcântara, la dulingva ĉiĉeronino



La partoprenantoj de la vizito al Placo XV-a